



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:
BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).
Abono (por 10 numeroj):

AŬstralia: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej — Ekster AŬstralia: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero — unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencej. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 148 (13th Year)

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

18 JANUARO, 1933.

RAKONTO DE VOJAĜANTO.

Tri vojaĝantoj sidis antaŭ fajro en la fumejo de provinca hotelo. Ekstere la pluvo falis ade; sed nur malklare aŭdis en tiu komforta ĉambro la bruoj de la muĝo. Kiel ofte okazas kiam viroj kune renkontigas la konversacio iam tuŝis la virinojn.

“Strange estas,” diris unu, “ke en la vivo de viro elstaras speciale nur tiuj aferoj en kiuj partoprenis virino. Mi bone scias, ke la virinoj estas malinteligentaj, kaj taŭgas al viro nur kiel distraĵoj; sed mi ankaŭ bone scias, ke la plej gravaj aferoj en mia vivo emas forgesiĝi, dum mi vive memoras ĉiun virinon mi iam amis.”

“Kiu provas,” diris alia, “ke la virino ne estas tiel malgrava, kiel vi sugestias.”

“Tute ne; — ĝi provas nur, ke la viro ne estas racia besto.”

La tria vojaĝanto sin intermetis. “Ĉu unu pravas, ĉu la alia, mi ne scias; sed certe tiu afero, pri kiu mi plej ofte pensas, koncernas virinon — la plej belan virinon mi iam renkontis. Estis antaŭ multaj jaroj, kaj okazis en mia propra lando . . .

“Mi devis viziti viron, kiu loĝis apud urbeo en le provinco. En tiu tempo, vi komprenu, mi estis agento de mia registaro. Mi finis mian negocon, kaj

komencis rapidi al la urbeo, ĉar necesis, ke mi telegrafe informu miajn estrojn pri la rezulto. Jam krepusiĝis. Noktaj ombroj miksiĝis inter la lastaj taglumoj, kaj ekpluvis malgaje. Antaŭ miaj piedoj glitis lacerto, kaj malaperis silente ĉe la vojlanko. Ĉirkaŭe la arboj kaj arboj ombre ond-movis pro fortaj ventoblovoj, kaj mi ekkuris laŭlonge de la nigriĝanta vojo al domo, kiu videbliĝas malproksime. Mi atingis ĝis la pordego kaj laŭte sonorigis. Dum mi atendis respondon mi rigardis interese la domegon, sur kiu la pluvo nun forte batis. Ĉiu fenestro hleve blanke brilis kvazaŭ oni ĉi tie festas ian specialan okazon, kaj inter la muĝbrujaj povis mi aŭdi malklare kaj tordite la tonojn de orkestro. Senpacienco mi sonorigis eĉ pli laŭte, kaj rigardis anticipe la varmajn domlumojn. La pordego malfermiĝis kaj aperis servisto kun ombrelo. Ni rapidis al la dompordo, — la servisto zorge tenanta la ombrelon super mi, kvankam mi jam estis tute malseka, — kaj eniris grandan vestiblon, brilantan per marmoro. Larĝa ŝtuparo supreniris de la malantaŭo de ĉi tiu vestiblo, kaj tien la servisto kondukis min.

Ĉe la dua etaĝo renkontis nin alia servisto kun mantelo, per kiu li ĉirkaŭis min. Li malfermis pordon kaj

mi eniris bele meblitan ĉambron. Sur la lito kuŝis vira kompleto. Mirante, mi formetis miajn malsekajn vestojn, kaj ekvetis min per la sekaj. Ili estis iomete malnovmodaj, sed ili ja estis tre riĉaj, subŝtoftaj per silko, kaj laŭ mezure taŭgis al mi preskaŭ perfekte. Mi rigardis en la spegulon, kaj preskaŭ mi povis kredi, ke mi estas ulo de antaŭa tempo. Mi sentis min ankoraŭ multe pli komforta, kaj scivolis al kiu mi devis danki pri tiu ĉi nekutima gastameco.

Kion fari nun? Ĉu estos pli bone ĉi tie atendi ĝis iu venos, aŭ malsupreniri kaj serĉi mian nekonatan bonfaranon? Mi malfermis la pordon kaj eliris en la koridoron. Mi povis neniu vidi. De malsupre mi aŭdis la mallaŭtan muzikon de l' orkestro. Subite ĝi ĉesis, kaj iu komencis ludi la pianon — eksonis la fajra kaj malĝoja “Désir ardent” de Fournier-le-jeune, kiu esprimas la senesperan amon de forlasita fraŭlino. Mi aŭskultis ĝis la fino, la sopirena fino — kaj tiam denove ekludis la orkestro.

Mi rapidis al la sube proksima etaĝo, kaj tra malfermita pordo mi vidis kapirolan fajron, la brilon de kristalo, la lumeton de polurita meblo. Hezite, mi eniris — kaj trans la ĉambron, kun entendiĝinta mano, aliris al mi bela juna virino. Kiel mi povas vortpenti ŝin? Brunulino, ŝiaj okuloj nigraj, nigraj,

misteraj, ŝia hararo amasigita malalte ĉe la nuko, ŝiaj brakoj nude blankaj. Gracie ŝi alpasis, ridetante. Mi klinis la kapon super ŝia mano. Mi serĉis ĝentilajn vortojn—stultege mi povis trovi nenion por diri.

"Do, fine vi venas, prokrastemulo," ŝi diris.

Ŝia muziko ŝia voĉo! Mallaŭta, vibranta—ŝi kantus kontraŭe.

"Ĉampano?"

"Dankon!" mi el respondis, kaj akceptis la glaseton.

Kion ŝi tiam diris, mi ne scias. Nur mi memoras, ke ŝi trinkis multe da ĉampano, ke ni ridis multe, ke pli kaj pli ŝi serĉis min.

"Ĉu vi ŝatus danci?" ŝi post iam demandis.

Ŝi kondukis min al dancejo. La orkestro estis kaŝita evidente post rozkovrita kradego, kiun mi povis vidi ĉe unu ekstremaĵo de la ĉambro. La planko brilis glite, flavete. Tiam ne ŝajnis strange, ke ni estas la nuraj dancantoj—tiam mi nur povis pensi pri ŝiaj skarlataj tremantaj lipoj tre apude al miaj. Ŝia fleksiĝema varma korpo klinis al mi, kaj ni dancis. Ni dancis sur lago de mielo. Ni dancis en mola maro de muziko. Mi sciis nenion krom la dolĉa odoro de ŝi, la dolĉa spiro de ŝi. Kune preniĝis niaj lipoj—ni dancis, dancis . . .

La proksiman matenon mi vekigis por vidi la varman sunon brilantan tra la fenestro. Miaj propraj vestoj kuŝis sur la tablo. Per la taglumo ĉio ŝajnis kvazaŭ iom sangita, iom pli malnova ol dum la antaŭa nokto. Ĉe pluraj lokoj la tapiŝo estis tute eluzita. Tamen mi ne longe pripensis ĉi tiujn aferojn, ĉar subite mi memoris mian gravan devon. Nepre mi devis esti ĉe la urbeto tiun matenon por telegrafi miajn estrojn. Rapide mi vestis min.

Ĉu vekis mian amatinon? Mi ekmemoris, ke ŝi ankoraŭ ne diris al mi sian nomon. Piedpinte mi iris al la pordo de ŝia propra ĉambro kaj tie aŭskultis. Movis nenio kaj neniu. (Ho ve! ke mi ne eniris.) Mi decidis rapidi al la urbeto kaj reveni tuj post la plenumo de mia devoj.

La ĝardeno, kiam mi alvenis la antaŭan nokton, ŝajnis al mi esti bela; sed vere estis tiam tre mallume;—kaj mi nun povis vidi ĝin plenan je malbonaj herboj kaj tute nezorgitan. En la ĝardeno mi ekvidis maljunan grizan virinon.

"Bonan matenon, patrino," mi diris.

"Ĉu vi povas diri al mi kiom laŭ distanco estas la urbeto?"

La maljunulino nenion diris;—nur rigardis min malĝoje momente, kaj malrapide turniĝis for.

Mi supozis ŝin esti eble surda aŭ stulta, kaj vokinte al ŝi, "Donu mian saluton al via mastrino," mi ekkuris al la pordego, kaj en la vojon.

Ĉe la urbeto atendis min letero;—mij estroj ordonis min, ke mi rapidu al la urbego. Mi ne kuragis prokrasti ori tiu; sed mi tuj rapide skribis letereton por peti mian amatinon, ke ŝi atendu ĝin mia reveno. Mi serĉis iun por porti ĝin—sed ĉiam, kiam mi prikskribis la domegon oni ridis, diranta, ke tie nur loĝas, kun ŝiaj maljunaj servistoj, tre maljuna virino, kiu permesis eniri neniu kun escepto de la komercistoj; kaj eĉ ili tre malofte vidis la maljunulinon mem. "Estas dirite," oni diris al mi, "ke antaŭ longe ŝi estis forlasita de ŝia amato; sed neniu certe scias. Estis antaŭ tre longa tempo. Estas dirite, ke ŝi estis neordinare bela."

Tamen mi laŝis la letereton al la hotelmaŝtro, kiu promesis sendi ĝin al la domego.

Kiam mi atingis la oficejon de miregistraro oni informis min, ke mi devas tuj forlasi la landon por entrepreni gravan kaj sekretan aferon. Tiam okazis la milito, vi scias. Dum kvin jaroj mi ne vidis mian propran landon. Sed mi neniam forgesis la belulinon de la granda domo. Kiam mi revenis, la domego estas malplena, silenta. Mi ne scias hodiaŭ, kiu ŝi estis, mia amatino, de kie ŝi venis, kien ŝi iris—eĉ mi ne scias ŝian nomon. Nur memoro, nur mistero, neforgesebla . . .

— "KINO"

TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following:—Melbourne Esperanto Club (Subs.), £1/14/-; Mr. C. Cowling, 4/6, Oct., '33; Brisbane Esperanto Society (Sales), 6/-; Mr. F. Taylor, 5/-, Sept., '33; Miss I. Sievwright, 4/6, Dec., '33; Mr. L. Thomson (adv.), 2/6; Adelaide Esperanto Group (Sales), 4/-; West Australian Esperanto Society (Sales), 8/- (Adv.) 5/6; Miss P. Berthold, 4/6, Nov., '33; Mr. F. Lühning, 6/-, Feb., '34; Mr. V. Sowry, 10/-, Apl., '34; Miss A. Jeffrey, 4/6, Nov., '33; Miss J. Gray, 4/6, Dec., '33; Miss E. Hynd, 4/6, Dec., '33; Coburg Esperanto Group (Sales), 8/8; Mr. M. Barnett, 5/-, March, '33;

Mr. N. Thomas, 5/-, July, '33; Sydney Esperanto Society (Sales), £1/4/- (Adv.) 5/6; Mrs. M. Humphries, 4/6, Nov., '33; Mr. Archer, 10/-, Jan., '35.

PYKE MEMORIAL EXAMINATION.

The second Pyke Memorial Examination was conducted simultaneously in Victoria, New South Wales and Queensland, on November 5th, 1932. Thirty-four candidates were examined; twenty-three from Victoria, seven from New South Wales and four from Queensland. There were twenty-one contestants for the special prize of five guineas awarded to the student who secures the highest pass after studying not more than one year, and thirteen for certificates only.

The contest for the prize was a very keen one and two of the papers had to be re-examined three times to make sure that a right decision had been arrived at. The winner proved to be Mr. S. Culler, of Richmond, Victoria, who passed with honor after only eight months' study. The examiners, in their report offered a word of commendation to the following:—Mr. K. Linton, the "runner-up," who after eleven months' study was so nearly successful in winning the prize and who gained the greatest number of points

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA. (fratorganoj bv. repres.)

in the oral examination; Mr. L. C. Cooke, who deserved special mention for the knowledge displayed after only four months' study; Mr. E. A. Turner, who though not eligible for the prize gained the highest number of marks.

Certificates were also awarded to the following:—Victoria—Misses E. Williams, D. Thorne, M. Davis; Messrs. G. Peers (with honor), A. Aldrecht, E. E. Curtis, E. Hearne. New South Wales—Misses D. Davies, C. Bridge; Messrs. L. Hillen, A. W. Peacock. Queensland—Messrs. E. G. Littleton (with honor), S. Leon Parry.

The Pyke Memorial Committee cordially thanks all those who helped to make the examination a success and will be grateful if group secretaries will urge new students to be competitors for the examination in 1933.

RADIO COLUMN

The Esperanto lecturer at 3LO regrets that he has been unable to follow in every detail the program published in "La Suda Krucio." On most occasions ten minutes was found to be insufficient to deal with points advertised. This difficulty has now been overcome as, from now on, fifteen minutes instead of ten will be allotted to the Esperanto session. Listeners will kindly note that the lessons are now given from 7.45 p.m. to 8 p.m. on every second Saturday evening. The dates, in the near future, on which the lessons will be given are Jan. 21st, Feb. 4th, Feb. 18th.

KRONIKO.

Wellington, Nov-Zelando.—La ĉiujara kunveno ĝenerala de la Wellingtona Esperanto-Klubo okazis je la 6a de Decembro. S-ro Bertram Potts, F.B.E.A., prezidis. Li rakontis la klublaboron dum la finonta jaro kaj substrekis la gravecon de laboro en N.Z. por Esperanto, dirante ke samideanoj alimondpartaj kuraĝigas pro tio ke samcelantoj en tia malproksima lando, kia Nov-Zelando, antaŭenpusas la lingvon. Li laŭdis la vic-prezidanton, s-ro Jack, pro lia gvidado de la klubo dum sesmonata vizito de li al Usono, kaj menciis speciale la ĉiusemajnajn ĵurnalraportojn, kiujn s-ro Jack preparis, kaj kiuj altiris multan intereson de la publiko kaj samtempe preparas la edukajn aŭtoritatulojn por doni jesan respondon, se ni eventuale repetos por la enkonduko de Esp-o en N.Z. lernejojn. Tiujn, kiuj fidele subtenis la klubon, kaj iliajn kunoficistojn s-ro Potts varme dankis.

La 5-a ĉiujara raporto kaj la bilanco, prezentitaj de la sekretario, f-ino G. Carty (33 Tanera Cres., Brooklyn), kaj de la kasisto, s-ro L. E. Dust, respektive, montris ke la klubo, kvankam iom pli malforta en la membraro (pro la ekonomia krizo) estas ankoraŭ en forta situacio finance, malgraŭ ke okazis en la jaro malgranda deficiito—la unua de post starigo de la klubo antaŭ kvin jaroj! Ambaŭ dokumentoj estis akceptitaj. La N.Z.E.A. sekretario, s-ro W. H. King, gratulis la klubon pro ĝia seninterrompa, sukcesa funkciado dum la jaro.

La voĉdonado por oficioj por la nova financa jaro, (kiu, la ĉeestantoj decidis, komenciĝos je la 1-a de novembro kaj finiĝos je la 31-a de oktobro,

ĉiujare) rezultis jene: Prezidanto, s-ro Bertram Potts, F.B.E.A.; Vic-prez., s-ro V. Leck; Sekretario, f-ino G. Carty; Kasisto, s-ro L. E. Dust; Komitatanoj, f-ino C. Smythson, D.B.E.A., kaj s-ro E. C. Jack; Delegito kaj Vicdel. al la 4a N.Z. Kongreso (Master-tono), s-ro Potts kaj f-ino Smythson, respektive.

Oni dankis la eksigantajn kluboficistojn, la honoran revizoron (f-ino L. Leck), kaj la lokajn redakciojn pro servoj faritaj kaj helpo etendita.

La klubo decidis inviti la 5an N.Z. Kongreson al Wellingtono en la venonta jaro; kaj klubdelegitoj ĉe la 4a tion faros ĝustatempe.

Antaŭ fermiĝo, la honora vivprezidanto de la klubo, s-ro W. L. Edmanson, F.B.E.A., mallonge parolis. Lia alvoko al ĉiuj tenu la Zamenhofajn idealojn firme en la koro por povigi la movadon sukcese trapasi la malfacilaĵojn tempojn rikoltis laŭtan aplaŭdon.

ZAMENHOFA FESTO.

Multaj homoj kunvenis en la klubejo la 13an de decembro por festi la datrevenon de la naskatago de la mortinta Majstro, kaj samtempe fini la jaran klubagadon per festa vespero. Lia prezidanta moŝto, s-ro Potts mallonge sed trafte skizis la vivon de d-ro Zamenhof kaj la naskiĝon de Esperanto; kaj s-ro Leck pridiris pri sia vizito al Eŭropo kaj la helpego ricevita per Esperanto servoj. Post tre ĝuinda programo, en kiu la "Golden Hula Muzikistaro" provizis muzikon kaj fraŭlino Joyce Leck dancis, la tuta kunvenaro ĉeestis la restoracion "Ritz" por petrinki kaj babiladi. Antaŭ fino, oni aranĝis renkonti unu la alian ĉe la 4-a Kongreso; kaj la prezidanto anoncis ke la klubo rekomencos je la 7a de februaro.

Adelaide.—The Adelaide Esperanto Club, which was started in September, 1932, finished the year with a celebration on Saturday evening, 17/12/32, at the home of Col. Fulton. All the members were present, and during the evening some interesting items were rendered.

As the secretary, Mr. L. C. Thornton, was leaving Adelaide for Melbourne at the end of the year, the Club gave him a "send-off." The president, Mr. Waterman, complimented Mr. Thornton on his enthusiastic efforts in getting the Club going successfully and on behalf of the Club members made him a fitting presentation.

In replying, Mr. Thornton thanked the members for their appreciation, at the same time pointing out that nothing would give him more pleasure than to see the Club go ahead in 1933 and be an overwhelming success.

The Club meets every Thursday evening from 12th January, at 7.30 p.m., at the 5th Floor, Parings Buildings, Hindley Street. Here the members will study Esperanto as well as arrange picnics and social gatherings.

As Col Fulton will be in charge of the Adelaide Esperanto Club, we take this opportunity of wishing him the very best of success in 1933.

ESPERANTO IN THE W.I.R.

The local section of the Workers' International Relief, the world-wide working class relief and cultural organisation, has taken up the study of Esperanto with enthusiasm. Last winter classes were formed in Port Melbourne, Northcote, Brunswick and Richmond. Since then a group has commenced study at Caulfield, and it is hoped shortly to form Esp. groups in the branches of the organisation at Prahran and Oakleigh. Of the earlier pupils, several have reached the teaching stage, while one student not only quickly assumed the responsibility of teaching, but carried off the Pyke Memorial prize. We refer to Mr. Cullif of Richmond.

Only very nominal charges towards the cost of the lighting in the various halls are made, whilst those who are unemployed are welcomed free of charge. Intending pupils should inquire re study nights and addresses of halls, at Mrs. Butler, room 8, National Chambers, 122 Bourke St., City.

ON CLARITY IN WORD FORMATION.

A language enriches itself (from its own elements) in two ways, (1) by proper derivation, that is, by the aid of affixes, and (2) by improper derivation, that is, modifying the sense of a word without modifying its form. To form "jardinet" from "jardin" is an example of proper derivation. To pass from the verb "diner" to the noun "le diner" is an example of the second. Preference given to one of these procedures over the other must of necessity influence the character of a language. It is clear that the first way, the indicating by prefix or suffix of the change in the sense of a word, is much clearer than the other. A language, then, is the clearer and more precise to the degree that it prefers the proper derivation to the improper. Take English, which has systematically

followed the latter road. The journalistic "French supply trouble in Syria" can at once mean "The French foment trouble in Syria" and "Commissariat difficulty experienced by the French in Syria"; while the title of an article "Red designs on China" could mean "Red motifs painted on porcelain" as well as "Sinister intentions of the Bolsheviks relative to China." Such examples show clearly the confusion and misunderstanding that may be engendered by the tendency of a language to employ one word in different grammatical roles and senses, without linking to it an affix indicating the change. (Then follows an illuminating study of the flexibility of Esperanto as demonstrated by the affixes "-ig" and "-pri-").

(Trans. from "L'Esperanto et la Stylistique," by Professor G. Waringhien, Lycee de Lille.)

LA PLUVADO ĈESTAS KONGRESO.

La pluvado! Kiajn diversajn impresojn tiu vorto faras sur la homojn! —Ĝojo, malkontento, teruro, Naŝpero, misero k.t.p. kaj kiel rapide ĝi povas ŝanĝi scenon de gaĝejon en absolutan malesperon.

Nun, imagu gloran matenon en Aŭgusto, ĉe Budapeŝto, sur la bordo de rivero Danube. La suno brilas serene kaj ne estas nuboj en la ĉielo. Naŝpero, misero k.t.p. kaj kiel rapide ĝi povas ŝanĝi scenon de gaĝejon en absolutan malesperon.

Sed, ho ve! En tiu momentoj ĉi aŭdas la vortoj "Jen pluvo!" Somera fulmotono subite venas el nenio, kaj post duonhoro la tuta sceno ŝanĝiĝas surside.

La ferdekoj havas multegon de personoj—estas nenio ŝirmilo—kaj tial la antaŭe ridanta homamaso sin trovas sub la tiraneco de la toranta pluvo. La muzikofilaro sur la starigiloj estas baldiĝi vera molajo; la malpezaj vestoj de la virinoj akroĝiĝas kiel naĝvestoj; la grizaj vestoj de la sinjoroj ŝajne nigriĝas dum la akvo penetras, kaj la formoj de la ĉapeloj rapide ŝanĝiĝas antaŭ la okuloj. Sub la tabloj kelkaj pasaĝeroj kaŭras, sed vane. Preskaŭ tiu la ferdeko similas al rapide fluanta rivero.

Sed subite, en la mezo de ĉi-tiu malgaja sceno, oni aŭdas unu kantistinon el la vortoj de "L'Espero" —"Tra la mondo—" Tuj ĉiuj kune kantas la himnon, ridetoj ekaperas kaj la kanto iĝas laŭta kaj pli laŭta, spile la pluvo, la kunvojaĝantoj regaĝas, kaj atendas ĝis la varma suno brilas por sekigi ilin. —Ili estas samideanoj, kaj ĉi la pluvo ne povas tute venki ilin!—(C. G.)

SERIOZE KAJ SERCE.

Tiu kiu luktas kontraŭ ni plifortigas niajn nervojn kaj akragas nian lertecon. Nia kontraŭulo estas nia helpanto. Edmund Burke.

Ĉiufoje kiam homo ridetas, eĉ pli ol kiam li ridas, li aldonas iom al la daŭro de sia vivo. Laurence Sterne.

La lasta vorto—Unua kato:—Ne ĝenu vin! Ĉio, kion vi ĵus diris al mi, eniris en unu orelon kaj eliris el la alia.

Dua kato:—Kaj kial? Ĉar estas nenio inter ili por haltigi ĝin!

Manĝo estis petolema, kaj la patrino estis ferminta ŝin en la litambro. Pro tio ke nenio sono venis el la ĉambro, la patrino vokis:—Ĉu vi nun estas bona knabino?—Manĝo respondis malafable:—Mi kraĉis sur vian ĉapelon, kaj mi kraĉis sur vian robon, kaj mi kraĉis sur viajn ŝuojn!

Patrino:—Vi malbona infano! Kion vi nun faras?

Manĝo:—Mi atendas pli da salivo.

A. (al amiko kun ĉapelskatolo sub la brakoj). Kien vi kuras?

B. Hejmen. Mi portas tiun ĉi novan ĉapelon al mia edzino.

A. Ĉu pro tio vi devas kuri tiel rapide?

B. Certe. Alie la modo estos jam ŝanĝita antaŭ ol mia edzino vidos la ĉapelon!

POR LA VIRINOJ. Raviolio de Italujo.

Faru paston per plentoso da faruno kaj varmeta akvo; aldonu kalkuleton da salo kaj tekuleron da olivkolo; miksu kaj flankenmetu por dek minutoj. Tiam egale dividu ĝin en du pecojn kaj platiĝu ĉiun porcion en tre maldikan kvadraton. Metu pecetojn (pilketojn) de farfaĵo en paralelajn liniojn de unu colo sur unu el la pastkvadratoj; malsekigu la paston ĉie inter la linioj per lakto, kaj surmetu sur ĝin la duan pastkvadraton. Kunpremu la paston inter la farpilkoj, tranĉu en disajn kvadratojn aŭ cirklojn, kaj kuiru en bolanta salakvo dum dudek minutoj, drenu kaj servu tre varmaj kun tomata saŭco kaj raspita fromaĝo.

La farfaĵo por la pilkoj—Bolu malgrandan pecon de bovaĝo ĝis mola; pecetigu ĝin kun la sama kvanto da bolita hakita spinaĉo, iomete da miksitaj herboj, pipro kaj salo. Miksu, kaj malsekigu per iom de la bovaĝakvo.

Aldonu kirlitan ovon kaj raspitan fromaĝon. Oni povas uzi la restaĵon de jam kuiritu viando.

Niaj abonantoj estos rimarkintaj la novan titolon ĉi la supro de nia gazeto. Ni ŝuldas tion ĉi al f-ino Ridley Ezard, al kiu ni proponas niajn sincerajn dankojn por ŝia artistia desegnaĵo.

"DR. ESPERANTO."

The Man and His Masterpiece.

In view of the remarkable progress throughout the world of Esperanto, the auxiliary language, it may be interesting to recall the story of its genesis and early years. In what circumstances did the idea of creating an international language first take shape in the brain of young Zamenhof, and what was the history of Esperanto during the years preceding its publication?

The idea to which he devoted his life came to him, strange to say, in early infancy, and from that time never left him. He was born with it; he could not imagine himself without it. This will help to explain the persistence with which he labored for it, and why, in spite of the difficulty and bitter disappointment, he never laid aside for long the slow travail of calling it into being, as so many other workers on the same field had done before him.

Lazarus Ludovic Zamenhof was born in Białystok, province of Grodno, Poland, in 1859. The place of his birth and infant years may be said to have given the direction to his entire future life. Its population consisted for the most part of four diverse elements—Russians, Poles, Germans, and Jews. Each of these elements spoke a different language and was held in suspicious enmity by the other elements. In such a town, more than anywhere else, a person of impressionable nature feels the weighty calamity of lingual diversity, and is convinced at every step that such diversity is at least a chief factor in disuniting the human family and dividing it into warring factions. He was educated as an idealist: that all men are one and brethren was axiomatic in his teaching he received. Yet at every street corner sights met his eye which made him feel that not men, but Russians, Poles, Germans, and Jews have existence. This bitter thought was a constant torment to his infant soul, though many possibly would smile at this "anguish for the world" on the part of a child. Because it seemed to him then that the person of mature years possessed something in the nature of almighty power to affect his will, he would repeat to an apostrophized humanity the promise that when he too was full-grown the evil of tongue-diversity would be forever done away.

Little by little he was convinced, of course, that the solution to such great

problems is not arrived at so easily as it presents itself to the child mind. One after another of his infant utopias was discarded, and only the dream of a second language for all persisted, never to leave him. He gave himself to it, but confusedly, nebulously, and without any definite plan. Later, he knows not when, but early in life, there formed in him the belief that the only international language possible must be some neutral idiom belonging to none of the present-day nations. When from the Bialystok technical school he was transferred to the Warsaw gymnasium, or classical school, he experienced for some time a fascination for ancient languages, and pictured himself travelling through the world, and with burning words inducing mankind to revive one of those tongues for modern use. With the passing of time, however, he came to the firm conviction that such a course would be impossible, and there began to form dimly in his mind the outline of a new, artificial language. Often he made attempts to give it substance by drawing up wonderfully flexible declensions, conjugations and suchlike. But a vehicle of human speech with its seemingly inevitable complexity of grammatical forms and its voluminous vocabularies, seemed to him such an unwieldy and colossal machine that more than once he sighed to himself: "Away with such nonsense; this task is not proportionate to merely human powers." Nevertheless, he always returned to his dream.

French and German he had learned in his infancy, at an age when one cannot rightly compare and make conclusions; but, when, being in the fifth class at the gymnasium, he began to learn English, its simplicity of grammatical structure markedly impressed him, and this all the more because of his sharp transition to it from Latin and Greek. He then noticed that multiplicity of grammatical forms is only a blind historical accident, wholly unnecessary to any idiom. With this thought uppermost he began probing deeper, eliminating from his projected language all useless forms, and noticing the while that his grammar became simpler and simpler in his hands until finally, without hurt to the language, it was contained within the compass of a few pages. The realisation of his life plan seemed at hand. But alas, ever the idea of the inevitability of massive dictionaries gave him no rest.

It so happened that when he was in the sixth or seventh class at the gymnasium he noticed the inscription "Shvejcarskaja" (public-house), which he had many times seen, and shortly afterwards, the sign "Konditorskaja" (sweet-shop). This suffix "skaja" held his interest and revealed to him that it and other such endings might well make it possible to establish categories of words representing ideas, which one would not have to learn separately. As this thought possessed

him more fully he felt the ground firmer under his feet, and there fell a ray of light on the troubling question of the colossal dictionaries, which now began rapidly to shrink before his mental eyes.

"The problem is solved!" he told himself, and straightway began compiling night and day lists of carefully selected suffixes. He well knew what vast importance to a consciously created language would be a full use of such a power — a power which in natural languages has effect only blindly, irregularly and incompletely. Diligently comparing words and searching out from among them constant, defined relations he every day displaced out of the dictionary a huge series and changed them by suffixes having a limited meaning. The mechanism of the language was now, as it were, on the palm of his hand, and fresh hope came to reinforce the love and persistence that characterised his work.

(to be concluded.)

RECENZ(ET)OJ.

POL-POMERANIO.

de Kazimierz Smogorzewski, tradukita el la franca de S. Grenkamp-Kornfeld; eldonita de Esperantista Voĉo, Jasło, Pollando. Prezo 2.50 svł., paĝoj 125, kun 26 landkartoj, el kiuj 4 plurlojara.

La Versajja Packontrakto dishakis Aŭstri-Hungaron kaj starigis la Polan Koridoron. Nun tre konstateble estas, ke per tio ĝi estigis sur la Eŭropan landkarton du precipajn danĝerpunktojn. Studentoj de la mondpolitiko akre malkonsentas pri la ĵusto aŭ malĵusto de la Parizaĵ decidoj, kies eĥoj nuĝminace penetras hodiaŭ la kancelariojn de preskaŭ ĉiu Eŭropa ŝtato.

S-ro Smogorzewski, eminenta pola publicisto, aperigis tre frapan libron en franca lingvo, La Pomeranie polonaise, pri la supra demando, kaj pro la intensa kaj vasta intereso generita de la problemoj ĝajnis inde, ke tia grava verko aperu ankaŭ en Esp-o. Tiel aperis neta sed tamen ampleksa mallongigo de ĝi fare de lerta samideano Grenkamp-Kornfeld. Per tio la libro fariĝas disponebla por tiu hommulto, kiu ne povas legi la francan lingvon.

En ĝi la aŭtoro resumas klare la historiojn, moralajn kaj ekonomiajn konsiderojn per kiuj Pollando dialektike batalas por reteni la disputatan regionon kontraŭ la germanaj pretendoj. La sobra lingvaĵo per kiu li prezentas sian argumenton, kaj lia riĉa dokumentado el germanaj fontoj, ne povas ne impresi legantojn eĉ la nesimpatiajn. En kurioza ĉapitro estas montrate, ke en la mondo ekzistas pli ol dek kvar "Orientaj Prusioj" kaj pli ol dudek "koridoroj", kaj ankaŭ estas demonstrata la gravo de maren-ĉirpo por Pollando el ekonomia vidpunkto.

Lastatempej eventoj, precipe la ĵusa pakto inter Francujo kaj Sovetio (des pli se tiu ĉi estis farita sen plena kon-

sento de Pollando) tre povas influŝi sur la estontan politikadon de la pola ŝtato, kaj meritis aldonadon ĉapitron en eventuala dua eldono.

Fermas sian libron Smogorzewski per la jena fereklaro: "Neniu pola politikulo akceptos iam rediskuton (pri la germanaj-polaj limoj). Se tiu mallarĝa fenestro, tra kiu estas malfermita al Polujo la mondo, estus minacita, tiam ĉiu poloj civitanoj defendus ĝin per ĉiuj rimedoj, kiel oni defendas tion, kio estas la plej kara en la mondo: la rajton al vivo."

La tradukinto, malgraŭ konstanta averto de Lingva Akademio, libere uzas neologismojn, sen akompana listo pledanta rajtecon de tiuj. Ofte la novaj radikoj ŝajnas al mi ne necesaj: ratifi, notifi, stipuli. Kion signifas "marko", "moreno", "veneda", "sbiro"? Kial uzi "suverenco" kaj "suvereno"? 35. Missence uzita "aktuala", 44, 47 "ignor"; "vojvedoj" (Fund. Krest. 323, vojvedoj); aliel (aliel); legioj (legioj); terorigi (terori); revidita (revizita); Stranga frazo: "en kies germanan senton oni ne povas dubi."

Valora dissemilo de porpola simpatio.

"5,000,000," originalo de S. Grenkamp-Kornfeld, 114-paĝa, prezo frs. 2, dua eldono. Eldonejo Esperantista Voĉo, Jasło, Polujo.

La kultura de ĉiu popolo — ne necesas laŭ venditaj lernolibroj, sed simple — laŭ libroj! Kompreneble aludo al la Esp-a "popolo." Nu, vastaskala kaj ĝenerala aĉetado de libroj kia "5,000,000" ne stampus ilin kiel kulturamantan popolon. Sed s-ro G. K. estas kulturita homo. Tion li pruvis per siaj antaŭaj servoj al lia literaturo. Des pli mirige do, ke li lasis presigi tian senvaloraĵon, kiu devis tempon rabi al la utaj verkoj, per kiuj li jam reklamas.

Frapaj nur estas la kriaŭta kovrilo kaj la misdo de la aŭtoro, ke la skribajo spegulas lian talenton.

Intersteno, la tiumonda stenokribo, elpensita de F. de Kunovskij, havas ankoraŭ pli ambician celon ol Esp-o, nome ĝi celas forigi entute la malfacilan, temporabnan longskribon, kaj fariĝi la unusola formo de kaligrafio por ĉiuj popoloj. Esp-o, kiel konate, celas nur servi kiel la helpa, dua lingvo, neniel forigante la naciajn.

Intersteno estas laŭ sia konstruo ĵen nacia ĵen interracia stenokribo, per kiu oni povas skribi en la patra lingvo, kaj en Esp-o, kaj en du dudekoj da aliaj lingvoj. Esp-o kaj ĝi havas ian simlecon inter si, en tio ke la unua alportis fundamentan reformon en la lingva sfero kaj la dua en la skriba. La Interstena movado praktike uzas Esp-on. Ĝia lernolibro estas plejparte eldonataj en Esp-o, kaj la nacilingvaj atentigas pri nia lingvo.

Ĉiujn informojn oni ricevas volonte de la Intersteno-Instituto, Friedenstrasse 79, Duisburg, Germany. (Robo).

LINGVA DISKUTEJO.

(Instigaj rimarkoj celantaj kulturi pli akran lingvosenton ĉe niaj progresintoj.)

A. F. Milward, en "La Dormanto Vekiĝas" skribis "ponto, kiu transiris la straton per nektrita suprena kliniĝo." Ĉu legantoj povas citi el unuarangaj aŭtoroj ekzemplojn de ĉi tiu adjektivo de la "adverbo de direkto"?

"Vi ne devas fari": "Vi devas ne fari." Logike la unua signifas: ne estas necese, ke vi faru, kaj la dua: estas necese, ke vi ne faru. Tamen Zam. kaj la granda plimulto de verkistoj uzas la unuan anstataŭ la duan, kaj pro tio oni devas akcepti ĝin kiel esperantan idiomismon. Personoj plaĉas al mi vidi la formon uzata korekte.

Cox eraras (p. 176, 4a eld., ĉe pleje). "Pleje" signifas "mostly, for the most part," kaj "malpleje," "leastly," "la plej malmulte." Komparu: Fund. Krest. 219/5. ... estas pleje subskribitaj de homoj, kiuj ne bone posedas la plumon."

Ĉiam skribu "ĉi tiu" ne "ĉi tiu." Oficiala Gazeto 4, 1911, p. 2, Zam. diras, ke eĉ meti streketon inter la du vortoj estas erare.

"Antaŭ fariĝi" estas malbona. Ĝin uzis Privat paĝon 73 de vol. 1, Historio de Esp-o. La estas lertega esperantisto, tamen en lia verkaro oni ofte vidas ateston de malzorgo. "Ol" ne estas forlaselbla antaŭ infinitivo.

"Multa knabino," p. 395, Fund. Krest. signifas "many a girl." Mi memoras similan formon en vol. 3 de La Revuo (1908-9), p. 407, "multa ridetanta valo." Sampaĝe sidas "Multa nigra monta gorĝo." Neniam poste mi vidis tiun formon.

"Know thyself." "Konu vin mem," "tre konu vin mem," aŭ "Elkonu vin mem." Kabe diras en sia vortaro: "Laŭ Sokrato la memkono estas la plej

malfacila afero."

Esperanto neniam havis la principon "unu vorto, unu signifo," kvankam iuj verkistoj pretendis, ke ĝi havas ĝin. Kaŭzo de la foja dusenceco de vortoj (homonimoj) estas ke Esp-o, ĝis certa grado, estas natura lingvo. La afero tamen ne estas grava, ĉar preskaŭ ĉiam la kunteksto ĵorgas ĉian dubon. Kompreneble restas ĉe vi, ĉu uzi aŭ ne uzi iun dubescan formon.

Bone estas ne uzi -ul kiam partecipa substantivo estas sufiĉa. Ekz. kapitolo (ne, kaptitulo), ŝanĝito (ne, ŝanĝitulo). Tre ofte tamen eĉ ĉe bonaj verkistoj oni vidas la trosufiksitan formon "konatulo."

"Orienta Indio" kaj "Okcidenta Indio" estas laŭ la nomoj en la lingvoj Angla, Franca, Germana, Hispana kaj eble en aliaj, por East and West Indies.

"I respect you too much to do anything like that." Malfacila esprimo angloj trovas ĝin tradukante. Jen Zam.,

"Mi tro multe vin respektas, por ke mi faru ion similan" (Georgo Dandin 41); "Ŝi estas tro artistino, por ke mia ideo al ŝi ne plaĉu." "Mi ŝatas vin tro, por povi iani enamiĝi en vin" (Ŝi la Tria 54/12, 51/30, Grabowski). (R.B.)

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOFF.

(N-ro 5)

Mi ne rakontos nun pri la signifo, kiun la mortinto (W. H. Trompeter) havis por nia afero; mi ne raportos pri ĉiuj liaj meritoj por nia afero. Ĉiuj esperantistoj scias tion ĉi tre bone, kaj sendube ili ĉiuj kune kun mi sentas la tamen pardon, kiun nin atingis. Al la novaj esperantistoj mi diros nur mal-longe, ke sen W. H. Trompeter nia afero nun eble jam de longe ne ekzistus. Antaŭ 10 jaroj la stato de nia tiam ankoraŭ tre juna afero estis tre malbona; ekzistis nenial rimedoj, por ion fari, kaj nia sola tiama gazeto

devis ĉesi eliradi. Tiam aperis Trompeter kaj, kvankam mem homo ne tre riĉa, prenis sur sin la tuten finanĉan ŝargon de nia gazeto, ne sole prenis sur sin ĉiujn elspezojn, sed difinis ankaŭ el sia poŝto salajron por la redaktoro, kaj sen brudo, sen sinlaŭdado, li per siaj propraj rimedoj en la daŭro de tri jaroj kondukis la gazeton ĝis tiu momento, kiam ĝi ekpovis jam stari sur propraj piedoj. Li ne refuzis sian helpon ankaŭ poste, kiam s-ro Gernet komencis eldonadi novan esperantan gazeton. Per lia mono ankaŭ aperis sistemoj kelkaj tre gravaj libroj, al kiuj li, pro celo de propagando, difinis tiel malgrandan koston, ke la enspezoj ne povis kovri eĉ duonon de la elspezoj. Ĉion li faradis sen bruo, modeste kaj silente, tiel ke la plimulto da esperantistoj eĉ nenion sciis pri liaj grandaj oferoj. ("Lingvo Internacia," 1901. "Originala Verkaro," 222.)

LA INDIĜENOJ DE AŬSTRALIO.

Gravajn rezultojn oni atendas de ekspedicio, kiu lastatempe ekiris al la Korsiko de Aŭstralio por progresigi la laboron, doni al la scienco kompletan konon de tiu raso, konsiderata esti la sola prahistoria raso restanta sur la tero—la aŭstralia indiĝeno. Opinianta, ke la indiĝena raso baldaŭ ĉesos ekzisti, sciencistoj rapidigas la laboron akiri konon pri ĝiaj moroj kaj historio. La ekspedicio konsistas el 12 homoj inkluzive de kinematografisto. Kvin aliaj ekspedicioj jam vizitis aliajn regionojn en la mezo de Aŭstralio.

Unu el la plej utilaj lecionoj lerneblaj el la indiĝenoj estas tio, kiel vivi pli ekonomie kaj ankoraŭ ŝane, kiam nutraĵo estas malabunda. Diskutante



Save 75 per cent. on your Esperanto Literature for 1933!

Write for FREE Prospectus, obtainable from the Manager.

"The SUDA KRUCO"

P.O. Box 731. Melbourne

la manieron de la esplorado, la estro, profesoro J. B. Cleland, diris: "Informante sin pri la fizikaj karakteroj de kiu ajn raso de homoj, oni povas fari gravajn deduktojn nur post kiam kolektigis granda kvanto da materialo. En antaŭaj ekspedicioj oni akiris grandan amason da mezuroj de diversaj partoj de la korpo de indiĝenoj, ankaŭ informon pri kolornuancoj de la haŭto, koloro de la okuloj, kaj aliaj tiaj trajtoj. Oni esperas, ke, helpate per la plua informo kolektota de la nuna ekspedicio, oni povos fari definitivajn konkludojn pri tio, kiel la aŭstralia indiĝeno diferencas de aliaj rasoj, kaj kiel doni pri li pli precizan sciigon kiel aldonon al la ĝisnuna multmanka impresio havata de la granda plimulto de la publiko.

"La ekspedicio ĝisfunde studas ĉion en la ĉirkaŭaĵoj de la indiĝenoj, kio povas influi sur ilin. Oni esploras tion, kiel ili sin ŝirmas kontraŭ ekstremoj de la temperaturo, sub la glaciiga punkto kaj super la 100° Fah. La naturo de la indiĝeno ebligas al ili ekzisti sub kondiĉoj, sub kiuj vivado por blankuloj estus neebla, tial la ekspedicio studos la treege ekonomian manieron, laŭ kiu ili uzas siajn mangaojn."

S-ro H. M. Hale, direktoro de la Adelaide'a Muzeo kaj ano de la ekspedicio, diras: "Post unu-du jardekoj estos tre malfacile trovi indiĝenojn vivantajn en sia naturo stato kaj sekvantaj la morojn, kiuj ekzistis antaŭ ol ili fariis rilatojn kun blankuloj. La Antropologia Fakultato en la universitato ĉiam forte urĝis, ke la registaro proklamu specialan rezerv-regionon, en kiun neniu blankulo eniru. La nunaj rezerv-regionoj ne estas efektivaj pro tio, ke estas permesate el blankuloj iri tien." La koston de la ekspedicio grandparte portas kaso fondita de la Rockefeller Foundation.

—Tradukis Gego.

PSEŬDOAFIKSJOJ.

Jen interesa artikolo kiu aperis en la "Proleta Studento":

En diversaj lingvoj ni trovas pli malpli regule afiksinoj. En la aplikado de tiuj afiksinoj ne estas reguleco. Esperanto estas laŭdire artefarita logika lingvo, tial ni progresemaj esperantistoj devas bone atenti la formojn de pseŭdoafiksinoj. Ankaŭ en la internacia lingvo troviĝas tuta serio da neregle aŭ almenaŭ nekonscie aplikataj pre-kaj sufiksinoj. Ĉe atenta pririgardo de

Esperanto ni observas mirinde kvantan nombron de tiaj, kiuj eniĝis kaj kiuj mokaĵas ĉirkaŭpetolas eĉ en tiu "arte-farita" lingvo. Ili simple transportigis Esperanton el la vivaj kaj malvivaj lingvoj, kaj estas nenia kaŭzo embarasiĝi pro la nelogikeco—male—ni celu profiti el tio, krei novajn vortojn el tiuj pseŭdoafiksinoj. La progreso sur ekonomia, politika kultura kampoj produktigas ankaŭ novajn komprenaĵojn, kiujn esprimi facilas en Esperanto. Same sin ankoraŭ kaŝas bonaj radikoj inter afiksinoj. Ni do iom sondu.

Pseŭdoprefiksinoj.

Politekniko, poligloto, polifono—poli t.e. plur.—aŭ mult-

monologio, monopolio, monotona—mono- t.e. unu

telegrafo, teleskopo, telepatio—tele- t.e. malproksimen

biografio, biologio, biomalto—bio- t.e. vivo

preludo, prelego, prefiksino—pre- t.e. antaŭ

aŭtoididaktiko, aŭtokrato, aŭtonomia t.e. aŭto- t.e. mem

teismo, teokratio, teologo t.e. te- t.e. dio

Pseŭdosufiksinoj.

Bankokratio, burokratio, demokratio—t.e. regado

monarĥio, hierarĥio, oligarĥio—arĥio, arkio t.e. regado

poligamio, monogamio, endogamio—gamio t.e. edzeco

sociologo, astrologo, ginekologo—ologo t.e. isto

redaktoro, tajloro, aktoro —oro t.e. isto

horoskopo, kalejdoskopio, teleskopo —skopo t.e. vido

Jen kelkaj el abundegaj afiksinoj aperantaj en Esperanto. Ĉe konsekvenca uzado de tiuj afiksinoj la lingvo multo riĉigos. Tute ne domaĝus uzi la vorton **telen** anstataŭ "malproksimen" aŭ **kratio** anstataŭ regado.

LA EDZINO DE LA BRUTAR-PELISTO.

(daŭrigata)

Ŝi donas al ili iom manĝi, kaj tiam, antaŭ ol mallumiĝas, ŝi eniras la domon kaj ekprenas kelkajn kapkusenojn kaj litkovrilojn—atendante ĉiujmomente vidi aŭ eĉ meti la manon sur la serpento. Ŝi faras litan sur la kuireja tablo por la infanoj, kaj sidas apude, por gardi ilin dum la tuta nokto.

Ŝi duonokule rigardas la angulon, kaj havas verdan bastonon pretan sur

la ŝranko ĉe sia flanko; ankaŭ korbon plenan da kudraĵo, kaj ekzemplero de la "Jurnalo por Junaj Fraŭlinoj." Ŝi jam venigis la hundon en la ĉambron.

Tommy enliĝas, protestante, sed diras ke li restos la tutan nokton sendorme, kaj frakasos tiun —serpento.

Lia patrino demandas al li, kion da fojoj ŝi jam ordonis lin, ke li ne blasfemu.

Li havas sian bastoneton kun li, sub la litkovrilo, kaj Jacky protestas: "Panjo! Tommy gratadas min per sia bastoneto. Diru al li, ke li forjetu ĝin!"

Tommy:—"Fermu la buŝon, vi malgranda —! Ĉu vi volas ke la serpento mordu vin?"

Jacky silentas.

"Se ĝi mordos vin," diras Tommy, post paŭzo, "vi ŝveligos, kaj odoros, kaj iĝos tute ruĝa, kaj blua, kaj verda, ĝis vi eksplodas. Ĉu ne, patrino?"

"Nu, do—ne timigu la infaneton. Dormu nun," ŝi diras.

La du pli junaj infanoj dormas, kaj foje Jacky plendas ke li estas preme-gata. Pli da spaco estas aranĝita por li. Baldaŭ Tommy diras:—

"Patrino, aŭskultu al tiuj —didelfoj. Mi ŝatus premtoridi —kolojn."

Kaj Jacky protestas dormeme:—

"Sed ili ne dolorigas nin, la malgrandaj —! "

Patrino:—"Nu—mi diris al vi, ke vi instruus Jacky kiel blasfemi." Sed la rimarko iĝas ŝin rideti. Jacky ekdormas.

Baldaŭ Tommy demandas:—

"Patrino! Ĉu vi pensas ke oni iam ekstemos la —kangurono?"

"Ĉielo! Kiel mi povus diri, infano? Dormu, nun."

"Ĉu vi vekos min se la serpento elvenos?"

"Jes—ekdormu!"

La meznokto alproksimiĝas. La infanoj ĉiuj dormas, kaj ŝi ankoraŭ sidas tie, kudrante kaj legante laŭvice. De tempo al tempo ŝi rigardas al la planko kaj murtrabo, kaj, kiam ajn ŝi aŭdas bruon, ŝi etendas la manon ĝis la bastono. La tondro komenciĝas kaj la vento, blyvegante tra la fendetoj en la muro, preskaŭ estingas la kandelon. Ŝi metas ĝin sur ŝirmatan parton de la ŝranko, kaj fiksas gazeton por protekti ĝin. Ĉe ĉiu ekfulmo la fendetoj inter la plataj ŝtupoj de la muro brilas kiel polurita argento. Muĝas la tondro, kaj la pluvo torrente falas.

(daŭrigota)

POR LA KOMENCULOJ.

KVINMINUTA RAKONTO.

La eta flavvizaĝa hino kiu sidis sub blua ombrello en la vendejo, kaj, po unu penco por ĉiu, rakontis historiajn al la infanoj, kunmetis siajn longajn fingrojn, kaj komencis.

Miaj infanoj (li diris), iĝi lerta estas virto, sed havigi erudicion, kaj malgraŭe ne havigi prudenton, estas senutila, kiel vi komprenos per tiu ĉi rakonto.

Foje, riĉulo havis kvar stultajn filojn, kiu fakto tiel kolerigis lin, ke li elsendis ilin el la domo, kaj ordonis, ke ili ne revenu ĝis ili akirus ion de saĝeco. Trovinte, ke tiuj kiuj ne povas labori ne povas manĝi, la kvar mallaboremaj fratoj vojaĝis al urbo kiu famiĝis kiel loko de klereco, kaj tie ili disigis kaj konsentis renkonti ĉe la krucvojoj post tri jaroj.

La plej aĝa sin aligis al hirurgo por lerni la anatomion; la dua sin lernkontrakts al kemiisto kiu havis miregindajn scion de sanigaj medikamentoj; la tria, pli modesta, iĝis helpanto al tanisto; kaj la kvara eniris la laborejon de astrologo kaj sorĉisto, kiu instruis al li la metion de magistro.

Post tri jaroj, la fratoj renkontiĝis ĉe la krucvojoj, kaj ekvojaĝis hejmen, kaj en sia vojaĝo ili hazarde eltrovis aron de ciganoj kiuj ĵus estis finintaj senhavigi kaj pecigi grandegan tigron, kiun ili enkaptiligis en la ĵangalo.

(Daŭrigota)

FIVE-MINUTE STORY.

The little yellow-faced Chinaman who sat under a blue umbrella in the market-place, and for a penny told stories to the children, put his long fingers together and began.

My children (he said), to become clever is a virtue; but to have learning and yet have no common sense is useless, as you will see by this little story.

Once a rich man had stupid sons, which annoyed him so much that he turned them out of the house and commanded them not to return until they had acquired some wisdom. Finding that those who cannot work cannot eat, the four idle brothers set out for a city which was noted as a seat of learning, and there they separated and agreed to meet again at the crossroads in three years.

The eldest placed himself under a surgeon to learn anatomy; the second apprenticed himself to a chemist with a marvellous knowledge of healing medicines; the third, more modest, became assistant to a tanner; and the fourth entered a laboratory of an astrologer and sorcerer, who taught him the craft of a wizard.

At the end of three years the brothers met at the crossroads and began to travel homewards, and on their journey they came across a band of gypsies, who had just finished skinning and cutting up an immense tiger which they had trapped in the jungle.

(To be continued)

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary: Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Western Australian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉi-semajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masterton Esperanto Club — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A. Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President, Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Workshop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiutage je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenoj: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18ia horo.

Sydney Esperanto Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-st., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Viceprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Duest, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

OBITUARY.

With sincere regret we announce the death of Mrs. Purnell, at a private hospital in Malvern, on 28th December. For many years an active member of the Melbourne Esperanto Society, this fervent spirit was compelled some twelve months ago to resign, on which occasion she was elected a life member. We respectfully tender our condolence to all concerned.

LA KOBURGA KLUBO.

Je l'15a de dec. okazis la ĵarfina kunveno de la Koburga E. Klubo. Malgravi veterado la prez-o, s-ro E. Williams, bonvenigis sepdekkelkajn da ĉeestintoj. Li mallonge parolis pri la kontentiga progreso de la klubo dum 1932 kaj pri la oftaj festvesperoj, kiujn ni provis al ĉeestintoj. Per dancado plezurigis sam-oj kaj iliaj amikoj, kaj inter ĉio ero estis kanto, deklamo, E. humoraĵo. Vespermanĝetino, ni dancis ĝis noktomezo. La klubo kunvenis je la 12a de jan. en la Laborista Kunveno.

A. C. HINTZE (gazetkorespondanto), 7 Dean-st., N13.

The next number is scheduled for 23rd Feb.

This number delayed on account of holiday.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Box 731F, P.O. Melb., by the Triumph Press, Surrey Hills, Vic.